

& Ho granda Dio:

< Rekante 33 el 65 batoj por strofo, entute 325 paŝoj dum 4 minutoj. Norda Kantaro #3102. Popolmelodio. Verkis Carl Boberg. El sveda tradukis William John Downes (1971).>

(#Melodio:

<:65> (

/(So SoSo Mi iSo SoSo LaLa Fa La a;La LaLa So oMi SoSo FaFa Mi i)×

(#Rekantaĵe: × h;So Sodo mi ire doTi doLa So o h;do '1 doTi Re e h;Fa LaSo Mi i '2 Tido re e;mi fa aTi do o o)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 /Ho granda Dio, kiam mi rigardas ; la mirindaĵojn kiujn kreas Vi, ; kaj ke senĉese Via amo ardas ; por teni ĉion en plenharmonia'

(×: × ; **Animo mia gloras Vin per kant'**, ; **ho granda /Di'**.)×

'2 Pri Vi parolas la somera vento, ; kaj floroj odorantaj en kampar', ; trilantaj birdoj en vespersilento ; sennombraj voĉoj de la kreitar'

'3 Miraklojn vidas mi en la Biblio, ; faritajn jam de tempo de Adam'; dum ĉiuj jaroj de mondhistorio ; ne ĉesis Via gracoplena am'

'4 Kaj kiam mi memoras pri la gloro ; de mia savo per la Krist-ofer', ; mi klinas min kun adorad-fervoro, ; dankante Vin kun pura kor-sincer'

'5 Kaj fine falos ĉiuj tempvualoj, ; kaj bonvenigos min Imanuel'; ravege sonos la anĝel-horaloj; ekĝuos mi la gloron de l' ĉiel' (×: (; **Des pli mi laŭde gloros Vin per kant'**, ; **kaj dankos Vin, ; ho bona Di'**.)×